Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**25-a de julio 2021, numero 14**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Premiitoj de Mondovizio



Kiel estis raportite en la lasta numero de LKdP la konkurso Mondovizio okazis dum la lasta tago de la VK. Tri partoprenantoj estis premiitaj. Gratulojn al: "Pli bona mond'" de Cally Berry (3-a premio), "La lingvo por ni" de Korea Esperanto-koruso "Amuze", kun Amira Chun (2-a premio) kaj "Homura" de Dudekses (1-a premio)! Ĉiuj premiitoj re-spekteblos en la jutubkanalo de UEA, *UEAviva*. Abonu: youtube.com/UEAviva. Ĉiuj premiitoj ricevos de UEA klubabonon de Vinilkosmo kaj muzikajn KD-ojn!

Pro antaŭvidita nedisponeblo Ariel Bonkorpa ne povis partopreni en la prezentado de Mondovizio kaj akceptis anstataŭi ŝin Michael Vrazitulis, kiu brile plenumis la gvidadon kun Tyron kaj Siru. UEA kore dankas al ĉiuj!

## Rapidu! Lastaj horoj por senpage aliĝi al Nitobe-Simpozio!

**Nitobe-Simpozio**
Lundo 26-a – Mardo 27-a de julio 2021
Temo: Lingvo, Konflikto, kaj Sekureco

La Nitobe-Simpozion organizas la Universitato de Ulstero kaj la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kun la financa subteno de Esperantic Studies Foundation (ESF). Pro la nuna situacio la Simpozio okazos virtuale, dum du tagoj: la 26-a kaj 27-a de julio 2021. La laborlingvoj de la evento estos la angla kaj Esperanto kun samtempa interpretado.

La Simpozio 2021 esploros kvar ĉefajn kampojn kun nuntempa graveco al la temo:

- Lingvopolitiko en Nord-Irlando kaj la sekvoj por la dividado de la povo en konfliktantaj socioj
- Lingvo kadre de sekureco kaj konfliktosolvado en Eŭropo
- Lingvo en humanecaj krizoj kaj anticipa packonstruado mondskale
- Antaŭenpuŝo de lingva justeco

Trovu detalajn informojn, la programon de la Simpozio kaj la aliĝilon ĉe: https://mallonge.net/gb

## Estraro respondis dum la 2-a VK

La 23-an de julio okazis la tradicia programero de la UK-oj kaj VK-oj "Estraro respondas". Ĝi daŭris ĉ. 1 horon, dum kiu la ĉeestantoj povis libere demandi la estraranojn pri ilin interesantaj temoj. Sume al la demandejo venis 19 demandoj. Temis pri multaj gravaj aspektoj de la nuntempo kaj estonteco de UEA: pri la Jarlibro, konstruado de la nova retejo de la Asocio, Montreala UK, kunlaboro kun TEJO, planoj okazigi UK en Afriko, elektoj de nova Estraro, kiuj devas okazi en 2022, Strategia Plano kaj alia.

Partoprenantoj de la VK povas spekti (aŭ re-spekti) plenan version de la programero en la sistemo Retevent: https://mallonge.net/gc

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo!
Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*



Duncan Charters, Prezidanto

Laboras pri Strategio, Kunordigo, Instruado



Fernando Maia Jr., Vicprezidanto

Laboras pri CO, Eksteraj Rilatoj, Ameriko ka.





Huang Yinbao (Trezoro), Vicprezidanto

Laboras pri Financoj kaj Unesko



Aleks Kadar, Ĝenerala Sekretario

Laboras pri Eŭropa agado, Ĝemelaj Urboj ka.




So Jinsu, estrarano

laboras pri Azio, Oceanio, Informado ka.





Jérémie Sabiyumva, estrarano

Laboras pri Afriko, Aktivula Maturigo



Orlando E. Raola, estrarano

Laboras pri Kulturo kaj Kongresoj, Biblioteko ka.



Amri Wandel, estrarano

Laboras pri Faka kaj Scienca Agado ka.

# Rezultoj de la AIS-ekzamenoj

Amri Wandel

Kiel estis anoncite en la Fermo (KdP 13), sume 50 personoj partoprenis la ekzamenojn en la kvar kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). La notoj videblas en la tabelo. Ĉar la ekzamenoj okazis virtuale, la partoprenantoj devis sendi la respondon rete, kaj la nomoj aperas en la tabelo laŭ la ordo de ricevo (ĉe nigraj truoj inverse, nome la lasta nomo en la listo respondis unue). En la dekstra kolumno aperas la noto (el 10) kaj apud la nomo de la kurso aperas la nombro de demandoj en la respektiva ekzameno.

En la ekzameno pri nigraj truoj estis ankaŭ premio por la unua senerara respondo, kiun gajnis Silvio Curtis de Kostariko. Li ricevos la libron *La Kosmo kaj Ni* de D.Galadi kaj A. Wandel (3-a eld. 2017). Ĉiuj respondintoj ricevos rete personan AIS-ateston subskribitan de la preleganto. La elektronikaj atestoj por la kurso pri nigraj truoj jam estis senditaj, por la aliaj kursoj – espereble baldaŭ.

Se vi ŝatus gustumi la ekzamenojn, ili videblas en la fino de la respektivaj registraĵoj,

IKU/AIS1 (Nigraj truoj 20.07)
https://mallonge.net/g8

IKU/AIS3 (Lunvojaĝado 21.07)
https://mallonge.net/g7

La registraĵoj de la aliaj du ekzamenoj, fraktoj (20.7) kaj kemio (23.7) ankoraŭ ne estas aktivaj en la virtuala kongresejo.

La tekstoj de ĉiuj kvar kursoj troviĝas en la IKU-libro (la unuaj kvar), senpage elŝutebla ĉe
http://iku2.trovu.com

| | Nomo | Noto |
|---|---|---|
| **Nigraj truoj** | | 12 |
| | Miguel Bento | 10 |
| | Davorin Jurac | 9 |
| | Adriana Dolca | 6 |
| | Floreal Gabalda | 8 |
| | Thomas Cordini | 8 |
| | Lia Gazzola | 6 |
| | Adam Parakasa | 7 |
| | Nikolao Gudskov | 6 |
| | Joel Fontaine | 8 |
| | Gilles Tabard | 5 |
| | Gustavo Magalhaes | 8 |
| | emiel vdf | 6 |
| | Baard Hekland | 7 |
| | Victor Petruchok | 5 |
| | Christian Lavarenne | 6 |
| | Herman Ranes | 8 |
| | Eran Yuval | 8 |
| | Juan Schmitter | 6 |
| | Terumi Honda | 6 |
| | Alfred Heiligenbrunner | 8 |
| | Cvi Solt | 8 |
| | Martin Decaluwe | 9 |
| | Silvio Curtis | 10 |
| **Fraktoj** | | 10 |
| | Amri Wandel | 8 |
| | Floreal Gabalda | 6 |
| | Suzanne Bolduc | 9 |
| | Miguel Bento | 10 |
| | I.R. van de Stadt | 8 |
| | Silvio Curtis | 9 |
| | Martin Decaluwe | 8 |
| | Alfred Heiligenbrunner | 8 |
| | Johan Swenker | 10 |
| | Christian Lavarenne | 8 |
| **Lunvojaĝado** | | 13 |
| | Martin Decaluwe | 9 |
| | Silvio Curtis | 9 |
| | Jean-Marc Lugrin | 9 |
| | Cvi Solt | 10 |
| | Mariko Aoshima | 9 |
| | Amri Wandel | 10 |
| | Eran Yuval vodevoz | 9 |
| | Floreal, Gabalda | 10 |
| | Honda Machimura Terumi | 6 |
| | Anders Sundman | 10 |
| | Christoph Brandes | 8 |
| **Komputada Kemio** | | 1 |
| | Rafaelo Daŝgupto | 10 |
| | Amri Wandel | 10 |
| | Alfred Heiligenbrunner | 10 |
| | Ingvo van de Stadt | 10 |
| | Jean-Marc Lugrin | 10 |
| | Silvio Curtis | 10 |

# Kunmanĝado tra la mondo

Marija Belošević

La 21-an de julio, merkrede, dum du horoj esperantistoj de diversaj partoj de la mondo montris la naciajn specialaĵojn, sed same siajn spertojn rilate la kuirarton.

Unue sur la tablon venis la festa raviolo Ĝjaŭzi, prezentata de Lisa el Ĉinio. Helpe de la gepatroj (al kiuj ŝi tre ĉarme dum la preparo instruis Esperanton) ŝi ege interese prezentis la tutan preparproceson.



Tradiciajn kukojn nomitajn "spickukoj aŭ piprokukoj" prezentis Martina Kvarantan Šmitran (Kroatio). Ŝi bone ligis la kukon kun la mencio de la unua kroata romano tradukita al Esperanto "Trezoro de l'oraĵisto" (de August Šenoa, tradukita 1911) en kiu oni i.a. parolas ĝuste pri ĉi tiu kuko.

Marija Belošević (Kroatio) alportis la "Zagreban menuon". Por la antaŭmanĝo ŝi servis la "paskan matenmanĝon" kun grasŝrumpaĵoj. Kiel ĉefa plado sur la tablon venis "sarmo", acidbrasika rulaĵo garnita per farĉo kiu ja estis konata al iuj ĉeestantoj, sed alimaniere preparita. Fine, kiel deserto venis kukurbstrudelo "bučnica", specialaĵo de la ĉirkaŭzagreba regiono.

Tre interesan japanan specialaĵon "Oyako-Donburi" (kokina viando kaj ovo) prezentis Mariko Aoshima (Japanio/Germanio). Sed aldone, ŝi prezentis aron da "Donburi", kaj certe ŝi povis tuj kapti la preferatan.




Orlando Raola (Usono/Kubo) ankaŭ ĉi-jare malfermis sian kuirejon, kaj tre majstre preparis krokedojn el ŝinko kaj ĉorizo. La preparo estis vere realtempa, ĉar en la momento de prezento la krokedoj ja venis sur (veran) familian tablon en la domo de Orlando por la matenmanĝo!



Gejme Badenĝun (melongena kaj vianda miksaĵo), prezentita de Ahmad Mamdoohi kaj Marjam Ŝokuhfar el Irano al la monda tablo alportis apartan guston.



La kunmanĝado finiĝis per abunda tablo el Svislando. Mirelle Grosjean kun siaj familianoj kaj lokaj esperantistoj pretigis kuniklon laŭ tiĉina maniero kun maiza kaĉo. Ili same pretigis salaton kaj deserton „diplomato" (trinivela bongustaĵo, kun unua nivelo framboj kaj biskvitoj kun kirŝo, dua nivelo vanila kremo, tria nivelo kremo Chantilly) kaj glacikukon kun bazo de absinto.



Dum la prezentado, kun la komentoj, rememoroj pri iuj manĝoj aliĝis pluraj kongresanoj.

Ĝojigas la informo ke oni planas pretigi kuirlibron kun la receptoj de la pasint- kaj ĉi-jaraj virtualaj mondaj kunmanĝadoj.